



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en ulio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoĵ. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoĵ.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 133 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. JULIO, 1931.

ATENTU LA JENON !

En akra pen-doloro akuŝiĝis la nuna numero. Ĝuste nur en lasta Juni-tago la Administracio povis decidi la organon ankoraŭ unu fojon eldonigi. Dank'al lastmomenta abono, kiu kompletigis la pagendan al presisto monsumon, estis eble al ni, eviti tion, ke La S.K. neapere dormu por Julio.

Tro da tempo devis pasi antaŭ ol la sumo kolektiĝis ĉe ni; restas do nur tempeto, dum kiu ni febre kunskrapu. denove minimuman 95-ŝilingon por la sekvanta n-ro. Ĉu ni sukcesos elfluti el poŝo de la armeeto da abonfinuloj eldonpagon por aŭgusta n-ro? Tempo respondos.

Ankoraŭ afero. La Administracio devas havi sub la mano iom da rezervmono, por certege eldonpovi la N.Z. specialajn n-rojn. Por tiuj la N.Z.E.A. pagas subvencion, preskaŭ kvaronon de la preskosto; tial, antaŭ ĉio nepre devas eniri la mondon precipe tiuj kvarfoje en la jaro aperantaj n-roj, kiuj cetere estas dissendataj en 699 ekzempleroj.

Finfine, la sorto de la gazeto dependas tute de la subteno de l'homoj ĝin ricevantaj; se ja venos aborta monato, tie signifos, ke via redaktanto, manke vian kolektivan helpon, suriris la vojon solan por li ireblan.

B.E.S. ADRESARO.

9a Eldono, 1931.

Ni povas fide rekomendi ĉi tiun zorge kompilitan adreslibreton al korespondemaj kaj kolektantaj Esp-istoj. Ĝi bone suplementas la oficialan jarlibron U.E.A. Lerninda listo de mallongigoj sin trovas, krom paĝoj de fotetoj, inter kiuj aŭstralia vizago. Majstre eldonita laŭ teknika vidpunkto. Prezo unu svisfranko, de Bohema Esperanto-Servo, Pótštejn, Ĉeĥoslovakio.

NATIONAL ESPERANTO ORGANS.

There is yet opposition in some quarters to "La Suda Kruco" on the allegedly economic ground that it would serve the movement better to send the European Esperanto journals what money we in Australia have to spare for our reading matter. Let us examine this contention.

We may compare the Esperanto movement to a living human body. The U.E.A. is the heart; the various national associations and federations are the arteries; the wide-flung "groups" are the veins; the Fundamento is the blood; and the influence and inspiration of Dr. Zamenhof form the spirit that animates the whole. It is clear that if one part ceases to function, the rest suffer. A steady supply of life-giving force to the heart of the movement can be transmitted only by effectively functioning national bodies, small and large, and these can act effectively only if regularly informed by a commonly-read national journal.

A live Esperanto gazette inspires as well as informs. A point often overlooked is that in every country a certain percentage of those that receive the national Esperanto paper are in full sympathy with Esperanto and admire the character of its founder, but for this reason or that are not able to read the language. Their support is welcome, even necessary. ["De Beaufront kreis kategorion de aprobantoj kaj tiel akiris helpantajn aliĝojn de tiuj personoj, kiuj ne volis peni por lerni la lingvon, sed volonte donis kelkajn frankojn por esti informataj pri la progresoj de laŭ ili utila ideo." (Privat, Hist. de E. p.43).] Their interest must be retained. The national organ, with its bilingual content, means something to them. They read

it in the national tongue with pleasure and inspiration. Parenthetically, the writer was recruited to the service of Esperanto by a sympathiser who, however, could not read the tongue.

Apart from this is the matter of national propaganda by means of articles and news of Esperanto progress; good work is done in the way of reproduction from national Esperanto gazettes by by-circulation sheets which receive them in exchange or similar.

The cost of running at least a modest national organ is not crushing; the price of a night's light opera in many cases covers the individual's yearly quota of support. Let us by all means stand behind "La Suda Kruco" in its fight for life in this dark hour.

ROTARY AND ESPERANTO.

The International Service Committee of Rotary International at Frankfurt, Germany, reports that interest in Esperanto prevails among Rotarians. Among others who devote their time to the study of that language and recognise its importance as a means for exchanging ideas between peoples of various languages is Rotary's past president, Sir Charles Mander. A universally accepted language such as Esperanto would mean a great deal not only to Rotarians of various countries, but also Rotarians of the same club, who in some countries speak different languages.

A considerable number of Rotary clubs have members of various mother tongues and in such a common medium in Esperanto would find a warm welcome.

It is, then, specially gratifying to observe that Esperanto is gaining ground in a movement so essentially international as Rotary.

"HEROLDO DE E." CALENDAR.

It's a bit late, but it's worth mentioning that the above calendar should come your way for 1932. Most tastefully arranged, a leaf for each week, plenty of information about Esperanto, and a space for each day's notes, we think this desk companion worth the 1/6 asked for it. Turn to "Heroldo de E."

LA LINGVO DE LA PAPAGO.

Anekdoto de Anatole France, Tradukita Pan Loti.

Anatole France, kies delikata ironio tiel ridete trapikis la militarismon de lia propra Francujo kaj de aliaj landoj, ĉiam malamis la hipokritulojn, kiuj servas per la lipoj tion, kion ili en la koro funde malŝatas; kiuj nur lipservas pro tio, ke ili esperas profiti mone kaj honore el la servitoj. La majstro de franca literaturo eble plej abomenis la homajn papagojn, kiuj senpripense bruadas, imitante batalekriojn, devizojn kaj tiajn sensencaĵojn.

"Sinjoro Panneton de la Barge havis elstaran okulparon kaj malprofundan menston—Sinjoro Bergeret divinis, ke la homo venas por peti de li favoron.

"Kompreneble. Sinjoro de la Barge venis, 'por gratuli al Sinjoro Bergeret pri lia profesoreco ĉe Sorbonne,' kaj ankaŭ por enmeti vorteton pri sia filo 'Adhemar, kiu Sinjoro Bergeret rememoris, jam interesis pro sia nekapablo la aŭtoritatulojn ekzamenajn de la civila, milita kaj eklezia rondoj.' Sinjoro de la Barge laŭte subtenis 'La Armeon,' kaj, kiel ĉiuj bonaj 'patriotoj' de la periodo, li kredis sen rigardo al la atestaĵo, ke Kapitano Dreyfus estas kulpas. Tamen, malgraŭ sia patriotismo, Sinjoro de la Barge volis havigi al li filo certajon, kiu esceptus tiun de la militservo.

"Klarigante, ke Adhemar estas 'inteligenta' sed, ke li ne havas emon al la literaturo, Sinjoro de la Barge petis al Sinjoro Bergeret konsilon pri facila temo je kiu la juna stultulo povos havigi al si certajon....Fine Sinjoro Bergeret donis la sekvantan respondon:

"Estas iu Polinezia lingvo, kiun parolis je la komenco de la centjaro nur unu maljuna flavulino. Ŝi mortis, sed postlasis papagon. Germana studento kolektis kelkajn vortojn de la lingvo de la papago, kaj el ĉi tiuj li kompilis vortareton. Eble ĉi tiun lingvon oni ankoraŭ instruas ĉe la Lernejo por Orientaj Lingvoj. Mi konsilus, ke via filo petu informon.

"Ricevinte ĉi tiun konsilon Sinjoro Panneton de la Barge faris adiaŭon kaj enpense foriris."

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following:—

Per Mr. H. Lanyon, 22/6; Dr. Lamb, 4/6, 8/31; Miss Ryan, 4/6, June, '32; Rev. Galloway, 4/6, Mar., '32; Mrs. Griffin, 2/4, Dec., '31; Mr. Hayes-Williams, 4/6, Apr., '32; Mr. McInnis, 13/6, July, '32; Brisbane E. Soc., (advert.), 5/6, May, '32; Mr. Guilbert, 4/6, June, '32; Mr. N. Gaye, 5/6, Dec., '32; Mrs. W. Butler, 10/-, Apr., '34; Mr. Hudson, 10/-, July, '33; Miss Carrick (sales), 4/4; Miss L. Saw, 4/6, July, '32; Mrs. Heintze (sales), 1/-; Mr. J. Hills, 5/-, Dec., '32; Miss Cox (advert.), 2/- Total—£5/8/8.

ERROR.

Note that the dating of the last issue should read "Junio" instead of "Julio," and that "June" should be read instead of "July" in line 43. page 278.

KRONIKO.

Wellington, N.Z.—Daŭris la mardaj kunvenoj; jene estas programeroj. aldone al la kutima unuhora instruo. Eble aliaj kluboj povos profiti, adoptante nian laborplanon:—

5/5/31. Elmonro de E. literaturo kaj gazetaro kun taŭga parolado; lego, Egiptologio, s-ro E. Jack; paroloj, La Utileco de Salo al la Homaro, s-ro L. Dust; kaj La Kresko de la Internacilingva Ideo, s-ro J. Major; originala komedio, La Pasporta Fotografisto, rolis s-ro Bertram Potts kaj s-ro Major.

12/5/31. La Evoluo de la Barometro, s-ro Dust, kaj Interesa Promenado, s-ro Jack; originala komedio, La Servista Problemo, rolis f-ino C. Smythson, s-roj Major kaj Potts.

19/5/31. En la instrua horo improvizis parolis s-ro Major, La Dancarto; s-ro V. Leck, La Parolanta Filmo; s-ino C. Leck, Oni Lernas Ruglitanon; f-ino Smythson, Fiŝkaptado; s-ro Dust, La Ŝtormo sur la Maro, kaj s-ro Potts, La Pereo de Vaporŝipo. S-ro Major skizis pri Oomoto movado en Japanujo; s-ro Dust parolis pri La Barometra Diagramo; orig. komedio, La Botelo da Biero, rolis f-ino Smythson, s-roj Major, Leck kaj Potts.

26/5/31. La Lanindustrio, s-ro Dust; Fabelo de Havaja Insularo, s-ro Potts; komedio, La Reformita Trompisto, rolis f-ino Smythson s-roj Jack kaj Potts.

2/6/31. Paroloj kun nigratabulaj

desegnoj, Stenografo rilate al Esp-o, s-ro Major; Magnetismo, s-ro Dust; orig. komedio, La Nova Stenografistino (! prof-o Collinson proponas "stenistino") venas al la Fermo, rolis s-roj Major kaj Potts.

9/6/31. Oni la tutvesperon dediĉis al praktika uzo de E. Mallongaj paroloj de f-ino G. Carty, La Destino de la Teatro, kaj La Scienca Fenomeno de la Vetero; f-ino E. Duguid, La Literaturo de Esp.; s-ino Leck, La Psikologio de la Infano, kaj La Muziko de Antikva Epoko; s-ro Leck, Pierre Loti, la fama Franca aŭtoro; s-ro I. Gordon, La Prononco de Esp.; s-ro Major, La Einstein Teorio de la Universo; s-ro Potts, La Moderna Skolo de l'Arto; lekcioj, La Enigmo de la Sfinkso, s-ro Potts, kaj Akvo-divenado, s-ro Dust; orig. komedio, La Skandalo en la Fermo, rolis f-ino Smythson, s-roj Major, Leck kaj Potts.

Leginte la supron oni rapide konstato, ke nia klubo estas vera edukejo, kie membroj povas la scion pligi en tre agrabla maniero.

• **Masterton, N.Z.**—Malgraŭ ekonomie malprospera tempo la grupo daŭras flori sub s-ro Dewar, D.B.E.A. Vizitado al kunvenoj dum vintro estas kontentiga, kaj ĉi-jaro sendube pli sukcesas ol la antaŭaj. Ordo nova troviĝas nun ĉe ni en tio, ke du klasoj funkcias—unu por ĉiuj membroj marde, alia por spertuloj vendrede, kiam nur Esp-on oni parolas. Rimarkante progreson, ĉerpas ni kuragon.

Melbourne, Vic.—S-ro Ballard kontribuis interesaneron en la programo lastmonate. Li skizis la historion de Esp-o jam de jaro 1887, kiam d-ro Zamenhof donis sian benriĉan elpensadon al la homaro, ĝis la nuna tago.

Je la 22 junio s-ro Skurrie instruan parolon donis pri la muziko, uzante kartojn por plua klarigo.

Helpe al la J. G. Pyke Memorial Fund la Melb. Klubo prezentis koncerton en sia ejo la 24an de junio. Troviĝis sur bonregala programo, tute en Esp-o, kantoj, muziko, kaj du teatraĵoj—"Parker" kaj "The Woman's Hour."

F-ino Naomi Byatt, el Perth, feris en Melbourne kelkajn semajnojn, kaj ŝia vizito al la Societo faris al ni neatenditan plezuron.

SYDNEY ESPERANTO SOCIETY.

Successful Year.

Despite the economic crisis the Sydney Esperanto Society concluded a successful year on 11th June, when it in fact "came of age," this being the date of its 21st Annual General Meeting. Mr. Edgar Pryke presided and Secretary Leslie Pfahl was in unusually good form, remarking that the only way a man could get rid of an Esperanto Secretary's job was to die. The forty members present immediately wished him long life. Treasurer Davies received cheers when he announced that a sum of £18 remained in the Bank, and was flooded with proposals for spending it, which he resisted. He may yet be elevated to the Commonwealth Treasury.

The following officers were elected for the ensuing year:—President: Mr. L. Thomson; Secretary: Mr. L. E. Pfahl; Assistant Sec.: Mr. L. Hillen; Treasurer: Mr. Davies; Vice-Presidents: Messrs. H. Matašin, E. A. Pryke and Miss Bridge; Librarian: Miss Anderson and Auditor: Miss A. J. Harrison.

It has been decided to give a series of "Anti-Depression" Lecturettes at depression prices (free) between 7-8 p.m. every Thursday evening, and an effort is being made to secure sufficient publicity to secure support from the public. Three prizes are being given at the end of 1931 on the occasion of "Zamenhofa Festo" to the three best students at the lectures—a child, youth or girl and an adult. N. S. Wales readers of the "Suda Kruco" are asked to send or bring along their friends. The first lecture will be repeated on 2nd July, 9th, 16th and 23rd, and the "stickers" then taken through progressive stages of acquiring Esperanto. Lectures take place in the W.E.A. Rooms, 449 Pitt St. A number of new members resulted from similar lectures last year.

PAPERMONO.

Money order (poŝtmandato); Bank note (bankbileto, banknoto laŭ Revizoro 80/19); Postal note (poŝta monbileto); Paper money (papermono, monpaperetoj); One pound note (unu-funta (bank)bileto). Gego.

—TO LET—

In the popular mountain resort, Belgrave, Vict., comfortably furnished 4-r. cottage, with bathroom, E.L., 2 verandahs, accom. six, close tennis courts, shops, rail. station. Moderate rental. Apply Miss V. Cox, 31 Albany Cres., Surrey Hills, Melb.

CU LA VORTOJ ALIU, ALIES ESTAS GUSTAJ?

La finaĵoj de la Zamenhof-aj tabelaj vortoj (-al, -el, -u, -om ktp.) estas principe ligeblaj nur al la vortradikoj de la tabelvortoj (ki-, ti-, neni- ktp.) kaj ne povas esti uzataj kiel memstaraj finaĵoj. Tial vortoj kiel ali-es, ali-u, kelk-om ne estas ĝustaj. Nur -a kaj -o, ĉar ili estas finaĵoj adjektiva kaj substantiva, povas esti forlasitaj kaj anstataŭigitaj per aliaj finaĵoj aŭ sufiksoj. Do oni povas diri neni-igi kaj neni-igi anstataŭ nenio-igi kaj nenio-igi.

Dum la lastaj jaroj enkondukiĝis vortoj kiel: kelkiu, kelkiam, kelkie anstataŭ la vortoj: kelka iu, kelke iam, kelke ie. Ĉar tiaj vortoj estas kunmetaĵoj de plenaj vortradikoj, ili ne estas kontraŭregulaj.

PRI LA RADIKO "RADI'".

En Rostov (USSR) estas grupo "Proleta Rajono." La fondintoj evidente volis eviti uzon de "radio" pro la fakto, ke tutmonde jam oni konas la teknikan eltrovon sub tiu nomo. Ili volis ne riski miskomprenon, ĉar vere la grupo ne estas aro da senfadenentuziasmoj. La vorto rajono estas franca neologismo, "rayon" (A. ray). Ŝajnas, ke kelkaj verkistoj sentas bezonon foje distingi inter la du ideoj, el kio sekvis la preso en pola gazeto de la formo "radjo" por nomi la gravegan por homoj inventon. La vortaroj, eĉ la Plena Vortaro, ne donas duan difinon, "la scienco sendi kaj ricevi informojn per la elektraj fortoj de la etero." Tamen, ekzistas fundamenta parenceco inter la du ideoj, kaj dubinde estas, ke la neologismoj "rajono, radjo" tenos la vivon.

Korespondado.

Instruistino de elementa lernejo en Estonio deziras korespondi kun geesperantistoj en Aŭstralio. Adreso: Leontine Martin, Tartu, Raekoja 36,1. Estonio.

REMARQUE'S NEW BOOK IN ESPERANTO.

"Heroldo de Esperanto," at great expense, has acquired the translation rights of "The Road Back," a new novel by Erich Remarque, author of "All Quiet." Esperantists should buy this edition instead of those in the national languages, by this means at once encouraging the enterprising publishers and demonstrating by the book's ready sale the growing importance of Esperanto in this particular field. Details will follow.

SATESPRIMO EL JĴANUJO.

De nia malnova abonanto s-ro K. Takahaŝi, Ŝizuoka: 22/4/31. "Kor-tuŝite mi dankas vin pro via g-an-danimeco, ke malgraŭ mi ignoris tiel longe vian afablan averton pri elĉer-piĝo de mia abonmono, vi ne riproĉis min sed sendadas seninterrompe vian interesan gazeton. Jen mi sendas al vi poŝtmandate la sumon de 10 ŝil., kiun mi esperas vi ricevos siatempe. La marta nr-o de via gazeto alvenis al mi hieraŭ, dankon. Tute via K.T."

Ho se nur la aŭstraliaj multfoje-avertitoj tiel respondus! (red.)

ESPERANTO IN EUROPE.

"...Our situation in Europe is, on the whole, very favorable. Never has Esperanto received so much public attention as now. Technical difficulties caused by language diversity are increasing—and those who recommend Esperanto as the solution are increasing. Many important congresses, while realising the hindrance of polylingualism, yet show certain hesitancy in adopting Esperanto. Such an attitude is, however, natural to responsible bodies before making weighty decisions. An attempt was recently made (at Geneva) to overcome the language difficulty by means of an ingenious technical installation which, in our judgement, must prove to be a merely provisional solution. The use of Esperanto, and its consequent adoption, are inevitable. In this, time is working for us more rapidly than we may think. Let us, then, prepare ourselves for the decisive hour.

The economic distress in Europe is, however, a great barrier to our ad-

vance. The everyday need to safeguard one's mere existence paralyses idealism. If Esperanto is making slower headway than we have right to expect, the economic situation is the chief retarding factor. But we are optimistic enough to believe a change will and must come. So let us use our strength rationally, sparing ourselves for the day when an offensive will be entered upon along the whole front. Let us keep our hearts warm and our heads cool, in the knowledge that progress is the reward only by unceasing battle.

(From the report of the International Central Committee of the Esperanto Movement, 1929-30.)

ESPERANTO IN DUTCH COM-MERCE SCHOOLS.

The Dutch Ministry of Education, Arts and Sciences has decreed that from 1st September, 1931, the State will grant subsidies for the teaching, in commercial schools, of the following optional subjects: Stenography, Typing, Spanish, Malay, Russian, Swedish, and Esperanto languages. The subsidy is valid for one year, and is conditional on an enrolment of not fewer than 8 pupils (in a class) for stenography, and 5 for the other subjects. (Heroldo de E.)

"BAHA' U' ULLAH KAJ LA NOVA EPOKO."

D-ro J. Esslemont.

El la angla trad. Lidja Zamenhof. Eldonejo, "La Nova Tago," Weinheim, Germanujo. 191 pp. Prezo 4 ŝil.

Jen iom tre kompleta pritrakto pri la Bahaa religio, jam de la apero de Bab, heroldo de la ĉeffiguro Baha'u'llah, ĝis la morto en 1920 j. de la "mesiido" Abdul Baha. Sen literatura edukiteco la trio faskope verkadis klarigojn, lum-jetajn sur la bazajn principojn de la jam vaste diskonigata revelacio; Baha'u'llah uzis jen modernan persan lingvon, miksitan kun la araba, jen la plej persan, jen simplan, jen klasikan araban! Abdul Baha parolis perse, arabe, turke, kaj interalie profetis, ĉu mirakle? la frakason de l'franca (1871) kaj germana (1918) militaŭtokratioj; kaj, ke jam en 1957 "universala paco estos firme estigita, universala lingvo estos

enkondukita, miskomprenoj estos malaperintaj, la bahaa afero estos disvastigita en ĉiuj mondpartoj, kaj estos efektivigita la unueco de la mondo." Permesible estas dubeti.

La bahaismo forprenas unikecon for de la Kristo kaj kategorias lin nur kiel unu el kelkaj "Malkaŝantoj." Laŭ ĝia instruo la Kristo antaŭanoncis venon de granda mondinstruanto kun "pli plena kaj glora revelacio" ol la sia. Baha lerte fortikigis tiun tezon, citante Mateon 17, sed Marko 13/22 donas averton, kiu multaj povas direkti kontraŭe ĉe persaj "mesioj."

Kredeble estas vere, ke la organizita Kristismo povus forte sin riĝigi, suĉante el la bahaaj instrufontoj tion, kio al ĝi ankoraŭ tro mankas—sanan supernaciecon, kaj pli profundan inklinton studi la fenomenojn de disvolviĝanta historio, por trovi, ĉu vere ne ekzistas rilato inter ili kaj la profetaj voĉoj.

La traduko estas tre plaĉa. Nur pene trovataj formoj pikas: 16/2 "Se judo vidus sian infanon, donantan glason" (donanta); 19/3 mals. furio (vidu Plenan Vortaron; furiozo); 47/34, 58/8, 108/8 mals. "kontinui" estas ne-transitiva verbo; 59/8 potencia; 62, lasta linio, kaj 6a mals. "akto" (ago); 107/13 "faktorio" (jam oni uzas por tiu, "fabrik(e)jo," "manufakturo," "uzino"!); 155/6, aŭtokracio" (aŭtokratio); 103/3 "avanco" (Zam. uzis "promocio"); 178/13 "feĉo tra pastbulo"?

—Robo.

Gratulon

al s-ino L. Semb, Christchurch. pro sukceso ĉe la B.E.A. Elementa Ekzameno. Kiuj sekvos?

ERIK AXEL KARLFELDT,

la plej fama moderna sveda poeto, mortis en aprilo. Per tio la brita kulturo ricevis fortan baton, pro tio, ke li estis angla-universitata doktoro de filozofio. En 1917 oni proponis al li la Nobel-premion, sed Karnfeldt rifuzis "pro lia akademia pozicio."

Ĉi tiu versmajstro apartenis al tiu

kategorio de poetoj, kiuj restas nekonsistaj de la vasta mondo ĝuste tial, ĉar ili verkas en lingvo, kiun parolas nur kelkmiliono da homoj, kaj ke krome la poezio ilialingva estas netradukebla. Estas sendube, ke se Karnfeldt estus verkinta en lingvo franca aŭ angla, oni jam nomus lin vera iniciatoro de nova lirika skolo. (El "The Age," Melb.)

Ankoraŭ ekzemplo de la kultura subpremo de la nacioj, pro la fera fakto de lingva superregado. Precipe por la lingve malfortaj popoloj devas allogi Esperanto, ĉar per ĝi iliaj vortmuzikistoj povas rekte atingi tutmondan ŝatan-taron.

LA 3AN DE DECEMBRO, 1854.

De Nathan F. Spielvogel en
"The Lone Hand Magazine."

"La revolto ĉe Eureka estas la solnura pitoreska sangomakulo sur la blankaj paĝoj de Aŭstralia historio. Britaj oficialuloj nomis ĝin "bagatelaĵo," sed la malgranda batalo estis tre rezultoriĉa, ĉar ĝi tre helpis frakasi la oficialaĉan tiranecon tiaman, kaj establi demokratan regadon en Aŭstralio."

"La mallonga ribelo ĉe Ballarat (The Eureka Stockade—Palisaro de Eureka) en 1854 devenis de nejusta impostado de la orfosistoj kaj prema kolektado de tiu imposto. Ĉe kiu ajn horo policano povis postuli de orfosisto montron de lia fospermeso, kiun li devis pagi per unu funto kaj dek ŝilingoj en ĉiu monato. Pro nehavo aŭ nemontro de fospermeso sekvis grava monpuno. Pli kaj pli incitigis la fosistoj; ĉe granda kunveno ili publike bruligis la fospermesojn. kaj postulis diversajn politikajn rajtojn. Fine ili konstruis fortikaĵon, sub gvido de iu Petro Lalor, Irlandano, Vern kaj Thonen, Germanoj; Raffaelo, Italio; kaj flirtigis la standardon de nova regno; "la Respubliko Viktorio." Ducent sepdek soldatoj kaj policianoj atakis kaj en dudek minutoj venkis la ribelantojn. Mortis kvin el la solda-

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE. MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco. Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj.

Notu adreson:—

toj kaj ĉirkaŭ tridek el la ribelantoj. kaj tiel finiĝis la sola batalo sur Aŭstralia tero. La kondukanto, Lator, perdis la dekstran brakon kaj tamen forŝavis sin. Aliajn ribelantojn oni procesis, sed ne kondamnis: tamen al Lator oni nenion faris. Jarojn poste li fariĝis ano de la ŝtata parlamento, kaj eĉ ĝia prezidanto: homo modera kaj honorata. Post tiu malgranda eksplodo la orfosisoj ricevis pli justan impostadon; la orminado daŭris kiel tute paca okupo, kaj iom post iom transiris en la staton de proza, organizita grandindustrio." (Eltiraĵo de "Aŭstralio, Lando kaj Popolo," de s-roj Lauri Laiho kaj "Delsudo.")

Antaŭ la Gubernatora Domo en Melbourne uniformita gardisto mehanike paŝadis laŭ sia difinita distanco. Ĝi estis neimpona konstruo el ŝtono, havanta en la antaŭparto du etaĝojn, en kiuj troviĝis kvin malbelaj, kurtenitaj fenestroj. Meze de la fronto estis malgranda portiko kun du lonikaj kolonoj. Flagstango staris antaŭ la domo, kaj ligna budeto de gardsoldato troviĝis dekstre de la portiko.

Is "LA SUDA KRUCO" worth a Penny a Week to you? If so, send your subscription to us if you have any doubt as to your validity. It will be correctly acknowledged in the following issue.

BOX 731F, P.O., ELIZABETH-ST., MELB.

La gardisto, kun bajoneto eningita sur lia longa pafilo, tien kaj reen paŝadis dum sia teda deĵoro.

Subite li haltis.

Kotsprucita rajdpolicano alproksimiĝis, urĝante lacan ĉevalon laŭ la strato kaj ŝanceliĝante de flanko al flanko en la selo.

Atinginte la placeton antaŭ la Gubernatora Domo, li glitiĝis de sur la ĉevalo. "Depeŝojn por lia gubernatora moŝto," li raŭke sciigis. La tutan nokton li rajdis, kaj la koto jam kruste sekigis sur liaj vizaĝo kaj manoj. La pordo malfermiĝis, kaj Sir Charles Hotham aperis en plene parada uniformo, ĉar li amis la militistan vestaron.

Ambaŭ viroj lin salutis.

"Nu, homo! Kio estas?"

La alrajdinto ŝanceliĝe ĝisiris lin kaj emmanigis leteron. La gubernatoro deŝiris la koverton kaj liaj densaj brovoj sulkigis dum li legis.

"Bona Dio! Ĉu aferoj tiele marŝas?!" li diris mallaŭte. Post momento oni aŭdis lian ordonon—"Tuj sonigu la alarmon envicigi!"

La tranĉo tono de la klariono, la alarmo, la rapida moviĝado, la revuo de la armitoj! Post horo taĉmentoj de

la 12a kaj 14a regimentoj, sub kaptanoj Wise kaj Queada, estis pretaj por ekmarŝi. Ruĝaj vestoj kun baskoj, blankaj bekhavaj ĉapo, tre alte butonumitaj gamaŝoj, tornistroj surdorse, pafiloj enmane!

"Anglaj soldatoj!" alparolis Hotham, "Bandaĉo de fremdaj kanajloj, surfundaĵo de Eŭropo, jam armite minacas ĉe Ballarat. Vi devas dispremi tiun ribelon. Ĉiu pied-kaj-ĉevalsoldato en la kolonio ricevos alvokon, kaj postsekvos vin kiel eble plej rapide. Viaj kamaradoj estas en danĝero. Al ilia savo! For, for!"

La armeeto vive hurais, sin turnis kaj ektrotis for. Hotham rigardis ĝis ili fandiĝis en nubon da polvo. Je tio li repaŝis por eniri la domon. Ektrafis lian okulon la ekspreso dormanta en la gardistbudeto. "Hola vi!", li ordone vokis al siaj servistoj; "enkonduku tiun homon kaj prizorgu lin. Iu venigu mian ĉevalon."

Li rajdis supren al Hotelo Prince of Wales, por paroli al la grandanima generalo Robert Nickle (elp. nik'l).

Je informo pri la novaĵo la vizaĝo de la militisto akceptis seriozan mienon.

"Malbona afero ĝi estas. Malbona afero."

"Nu, Nickle, ne diru, 'Mi pri tio avertis vin.' Mi ne dubas, ke via opinio mi estas kulpas," varme diris Hotham.

"Mi staras preta plenumi la ordonon de via gubernatora moŝto," serene respondis Nickle.

"Pro Dio, do, tuj sekvu la taĉmenton kune kun ĉiu disponebla homo!"

"La ordono de via moŝto ricevos senprokrastan plenumon," respondis Nickle, kaj, salutinte, li paŝis eksteren.

Post du tagoj li foriris el Melbourne kiel ĉefo de mil soldatoj, kun municiaj vagonoj, kvar batalkampaj kanonoj, kaj rajtigo proklami la "diggings" (elp. dingingz; ormineja regiono) esti sub milita leĝo. Melbourne ekscite bolis. Ankoraŭ ne alvenis la tagoj de la telegrafo kaj specialaj ĵurnalistoj. Famoj kaj timigaj diroj disflugis tra la metropolo, kaj palvizaĝaj urbanoj staris en stratoj Collins kaj Bourke (elp. kolinz: burk), interŝanĝante ĉiam pli vasten terurajn neveraĵojn kaj sangecajn rakontojn. "Oni buĉis la tutan policianaron!" "Kvindek mil orfosisoj nun marŝas al Melbourne por ĝisgrunde forbruligi ĝin!"

Je la posttagmezo de la 1a de Decembro kunvenis sur Bakery Hill en Ballarat, granda amaso da orfosistoj. La unua marŝis Ross el Toronto, fiere portante la nove elektitan bluan flagon je ekstremo de longa stango. La viroj sin formis en procesion kaj marŝis mal-supren de la strato nun nomata Humfray-st. (elp. humfri strit), tiam en straton Main (elp. mejn) kaj poste, simile al grandega skolopendro, ili laŭiris supren de la strato Eureka (elp. jurika) ĝis sur la deklivoj de la monteto.

Neniu rajdsoldato, neniu policano vidigis.

La orfosistoj havis armilojn. Kelkaj portis pafilon, kelkaj la tiutempan grandan selpistolon. Carboni Raffaello svingadis super la kapo glavegon, restaĵon de la okazoj de la jaro 1848. Iuj posedis nenion pli efikan ol akrigitan ferpecon fiksitan al ekstremo de longa stango—ĉi tiujn armitojn oni nomis "la pikilegistoj de Vern." Multaj portis nenion pli militistecan ol sia pioĉo. Ĝi estis ja armeo de ĉiaspecaj homoj ĉiamaniere ekipitaj. Sed neniu priridis. Je tia tempo mokridado estus tute nekonvena kaj—danĝera.

Dum la procesio pretermarŝis centoj sin enmiksas en la huraantaj kaj kantantaj vicojn. La granda homamaso atingis la deklivojn de Eureka. Petro Lalor senembarase ordonadis. Oni devis fari barikadon, kiu enfermu proksimume du akreojn. Centoj da volontaj viroj rapidis al tiu laboro. Multaj el ili antaŭe gajnis sperton pri barikada starigo en Parizo, en la tagoj de la Commune (1). Post nemultaj horoj la tendaro estis enfermita per alta muro el lignoplatoj, amasigita minteraĵo kaj ŝtonoj.

Guste en la mezo, sur malgranda teraltaĵo, brave flirtis la nova blua flago: proksime staris dudek forĝistoj farantaj pikilegojn: pli fore, sur la terplato, Vern kaj Black kaj Ross ekzercis arojn da okulvideble nemilitistaj viroj.

En sia tendo Petro Lalor, la ĉefkomandanto, sidis kun sulkigitaj brovoj, enpenso frapante per la fingroj.

"Ho se ni havus pafajon! Se ni ne tuj venkos, tion ni neniam faros! Ni ne havas ŝargaĵojn po dekdu por ĉiu nomo. Kion fari?"

(daŭrigota)

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksoy-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario; s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Svdney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FB EA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland)

Wellington Esp-anto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.